

Enketo de la ŝtato Neuchâtel pri la bezonoj de la junularo, 2-a parto  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 534, 1974.01.02 & 05

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Oni multe parolas pri la junularo. Sed ĉu oni bone konas ĝin ? Ni raportis la pasintan semajnon pri la organizo de grava enketo, kiu tuŝis en 1971 sep procentojn de la junularo 16-20-jaraĝa de la kantono Neuchâtel. La proporcio de la demanditoj respegulas la ĝeneralan socian situacion de la samaĝa junularo, el tio la valoro de tiu enketo, kiu estis organizita kun la helpo de la Registaro kaj kondukata de fakuloj kiel sociologoj kaj statistikistoj, tio en kunlaboro kun multaj organizaĵoj.

A.- Laŭ la rezultoj de tiu enketo ni priskribos la sintenon de la neŭŝatelaj gejunuloj rilate al la temo : **Familia vivo kaj amikaro.**

Cl.- 27 demandoj de la enketo estis dediĉitaj al la temo **familia vivo kaj amikaro.** El la respondoj oni povas aserti tion ĉi :

A.- Dum la semajnaj tagoj la knaboj restadas meznombro nur unu vesperon en la familia hejmo. La 4 aliajn vesperojn ili trapasas ekstere de la hejmo kun gekamaradoj. Por la knabinoj la respondoj estas meznombro : 2 vesperoj en la hejmo, 3 ekster la hejmo. Estas interese konstati, ke la knaboj ĝenerale havas la impreson povi fari ĉion, kion ili volas, dum la knabinoj sopiras al pli da libereco.

Cl.- Post la lern-horoj 40 procentoj de la gejunuloj tuj rehejmiĝas, dum 55 procentoj iras al kafejo por diskuti kun gekamaradoj. Ekzistas diferenco inter la metilernantoj kaj studentoj. Tiuj lastaj ofte forlasas la kursojn pli frue, ol la metilernantoj la laboron. Pro tio ili tendencas pli ofte frekventi la restoraciojn. La ĉampionoj en tiu kategorio estas la studentinoj pli aĝaj ol 18 jaroj.

A.- Rilate al la manĝoj oni ricevas la ĉi-sekvan priskribon : 65 procentoj de la gejunuloj regule tagmanĝas hejme, 25 procentoj regule en restoracioj. La ĉefrolon ludas tiurilate la distanco inter la hejmo kaj la stud- aŭ labor-loko. 80 procentoj de la gejunuloj regule vespermanĝas hejme, 5 procentoj regule for de la hejmo.

Cl.- Koncerne al la semajnfinaj tagoj sabato kaj dimanĉo la enketo montras, ke unu tago estas ĝenerale dediĉata al la familia vivo, dum la alia estas dediĉata al kontaktoj kun samaĝuloj. Kiam oni informiĝas pri la disvolviĝo de ideala semajnfino, tiam la familio estas neglektata. Nur 5 procentoj de la gejunuloj opinias, ke ideala semajnfino disvolviĝas en la familio. 10 procentoj rigardas al la aktiveco en junularaj movadoj. Kaj 80 procentoj respondas, ke ideala semajnfino disvolviĝas kun amiko aŭ amikino.

A.- Por la ferioj la familio tamen ankoraŭ ludas ĉefrolon, tio almenaŭ por la metilernantoj, kies ferioj ĝenerale koincidas kun tiuj de la patro. La metilernantoj travivas la tutajn feriojn kun la gepatroj kaj la familio. Por la studentoj, kiuj havas pli longajn feriojn, nur 40 procentoj de la feria tempo disvolviĝas en la familio.

Cl.- Diversaj demandoj de la enketo celadis malkovri kun kiuj personoj la gejunuloj havas vere profundajn kaj intimajn konversaciojn. Montriĝas, ke la patro estas ĝenerale neglektata. La gejunuloj havas la plimulton de la intimaj kontaktoj kun samaĝuloj. Ni konstatas tiun ĉi

vicon : la gejunuloj sin malfermas unue al geamikoj kaj gefratoj : 60 procentoj, poste al la patrino : 30 procentoj, fine la patro estas menciata kun nur 5 procentoj.

A.- Konsil-petoj rilate al la profesio donas tute alian vicon. Tiam unue venas la patro : 35 procentoj, sekvata de la patrino : 20 procentoj. Sed oni konstatas, ke la gejunuloj sin turnas al multaj personoj. Poste ili komparas la ricevitaĵajn respondojn kaj akiras personan vidpunkton, kiu estas sendependa de tiu de la gepatroj. Tre ofte la gepatroj poste elektas la vidpunkton de la gefiloj. Estas interese konstati, ke la instruistoj estas malofte konsultataj por elekto de profesio, kaj ke la pastroj estas neniam menciataj en konsil-petoj, kiel ĝenerale en ĉiuj gravaj decidoj.

Cl.- Koncerne al la intima vivo oni rimarkas, ke la knabinoj serĉas amikiĝon kun **vera amiko**, al kiu ili restas fidelaj. Kontraŭe la knaboj estas malpli fidelaj en siaj rilatoj. 45 procentoj de la knaboj flirtas dum nur 25 procentoj de la knabinoj.

A.- Pri la konversacioj, kiuj okupas gravan lokon en la vivo de la gejunuloj ni povas diri, ke ĉe la knaboj la sporto, la sciencoj kaj la artoj okupas ĉef-lokon. La metilernantoj dediĉas eĉ 40 procentoj de siaj diskutoj al la sporto. Ĉe la studentoj la konversacioj estas pli variaj. Ĉe la knabinoj la sporto, scienco kaj arto okupas malpli gravan lokon profite al multaj aliaj diskutemoj. Estas interese konstati, ke kontraŭe al tio, kion opinias la plenkreskuloj, la temoj familio, geedziĝo, seksa vivo kaj drogo okupas tre malgrandan rolon en la junulara vivo. Tiuj temoj respegulas plenkreskulajn priokupojn. Pri la geedziĝo preskaŭ neniam parolas inter si la knaboj malpli ol 18-jaraj kaj tute ne la studentoj eĉ post 18 jaroj. Sed tiam la armeo okupas gravan lokon en la konversacioj.

Cl.- Antaŭ ol konkludi tiun ĉi raporton ni ankoraŭ menci, ke 40 procentoj de la gejunuloj apartenas al unu aŭ pluraj societoj, kaj ke inter tiuj societoj 30 procentoj de la gejunuloj akordiĝas por konkludi, ke la societa vivo plenumas gravan funkcion en ilia vivo. La koncernataj societoj estas sportaj grupoj : 20 procentoj, junularaj movadoj : 10 procentoj, muzik- aŭ kant-societoj : 5 procentoj kaj religiaj movadoj : 5 procentoj.

A.- La venontan semajnon, sur la bazo de la sama enketo pri la junularo en la kantono Neuchâtel, ni vidos, kio estas la sinteno de la gejunuloj rilate al la laboro kaj al la studoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!